



ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto. Nord-Pas-de-Calais & Picardie

Kunsido de la Federacia Komitato

Dato : 15 O K T 2006

Horaro : 9^a40 ĝis 13^a10 (3 h 30 min)

Loko : Lille (59) – Maison régionale de l'environnement et des solidarités, strato Gosselet

Tagordo :

1. Protokolo de la pasinta komitatkunsido
2. Administro, financo kaj membraro :
Membraro – Financo – Modifo de la interna regularo
3. Federacia kongreso kaj balotoj en 2007 :
Kongresurbo kaj dato – Organizo de la balotoj
4. Instruado kaj ekzamenoj :
Ekzamensesio en 2006 – Ekzamensesio en 2007 – Klubaj kursoj
5. Kulturo kaj aranĝoj :
Eŭropa Rendevuo de Morbecque en 2006
6. Regiona kunordigado :
Rilatoj kun UFE – Interfederacia Konferenco
7. Komunikado :
Strategio por diskonigado de Esperanto en norda Francio

Kunvokitoj :

		Ĉeestis	Senkulpigis	Ne ĉeestis
• Xavier Dewidehem, prezidanto.....	XD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• France Valet, vicprezidanto.....	FV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jean-Michel Dechaume, sekretario.....	JMD	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jacques-Henri Poiteau, kasisto.....	JHP	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Lucien Bourgois (<i>donis rajton al XD</i>)	LB	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Michel Dechy.....	MD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jean Dietrich (<i>donis rajton al XD</i>)	JD	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Marie-Jeanne Liné.....	MJL	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>
• Claude Longue-Épée.....	CLE	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Lucie Mazurkiewicz (<i>donis rajton al FV</i>)	LM	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Arlette Plutniak.....	AP	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Edmond Plutniak.....	EP	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Richard Valet.....	RV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Xavier Vilain.....	XV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

Sume, 12 komitatanoj ĉeestas (9) aŭ estas reprezentataj (3) : la kvorumo estas atingita.

N.B. : La reprezentataj komitatanoj estas signitaj per kursivo en la voĉdonrezulto.

Aneksaĵo(j) :

1. Modifo de la interna regularo de la Federacio

1. Protokolo de la pasinta komitatkunsido

Informoj : XD bedaŭras, ke pro diversaj kaŭzoj ne okazis komitatkunsido inter Nov. 2005 kaj Okt. 2006 ; kaj li certigas, ke tia komitatkunsida « vakuo » ne plu estos.

Decido :

La protokolo pri la federacia komitatkunsido de la 10^a de Novembro 2005 estas aprobita sen modifo.

Poras : Unuanime (12)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

2. Administro, financo kaj membraro

Informoj : 1. La Federacio enkalkulis 172 membrojn en 2006 (150 en 2005, 145 en 2004). La asocioj-membroj decatempe sendu siajn membrolistojn al JHP. Pro manko da efiko, CLE informas, ke en 2007 li ne realvokos per leteroj al (re)membriĝoj al la Federacio kaj UFE, pri kio konsentas la Komitato.
2. La federaciaj kasoj estas prosperaj ; necesas utiligi la enkasajn monon en federaciaj projektoj.
3. La Estraro proponas modifon de la interna regularo koncerne la sidejon, la reprezentatecon de la asocioj-membroj ĉe la Komitato kaj la konstantajn komisionojn.

Decido :

La Komitato alprenas la modifojn de la interna regularo prezentitajn en la aneksaĵo 1 (ununura).

Poras : Unuanime (12)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

3. Federacia kongreso kaj balotoj en 2007

Informoj : 1. EP informas, ke la klubanoj de Arras konsentis organizi la federacian kongreson en 2007. Ĝi povos okazi ne printempe sed en Sep./Okt. La kongreson ni povos enkadrigi en la departementa jaro pri Pollando ; la urbestro jam konsentis replanti Esperanto-arbon ; oni planas publikajn koncerton kaj dancan spektaklon ; la tagmanĝo povos okazi en superbazara restoracio kaj esti mem pagita de ĉiu manĝanto. La kongreskotizo (spektakloj) povos esti je 15 €. La klubo deziras havi financon garantion de la Federacio okaze de eventuala minuso, kaj doni al la Federacio duonon de la eventuala pluso.
2. XD proponas novan balotsistemon, similan al tiu de UFE, nome korespondan baloton. Tiu sistemo ebligas pli grandan atenton pri la balotoj, kampanjon de la kandidatoj, ŝparon de tempo dum la kongreso kaj voĉdonadon far la neĉeestontaj federacianoj. Kalkulinte la voĉdonilojn antaŭ la kongreso, oni anoncos la oficialan rezulton en la membrokunveno ; tuj poste publike kunsidos la nova Komitato por baloti la novan Estraron. La mandato de ambaŭ instancoj daŭros ĝis 2010.

Decido :

1. La federacia kongreso okazos en Septembro aŭ Oktobro 2007 en la urbo Arras (*dato precizigota*) ; ĝin kunorganizos la asocio-membro Arras-Espéranto kaj la Federacia Estraro. Pri financo la Federacio kaj la asocio-membro konsentas, ke eventualan minuson la Federacio monkovru ĝis 3 000 €, aŭ la duonon de pluso donu la asocio-membro al la Federacio.
2. La baloto pri la Federacia Komitato en 2007 fariĝos laŭ koresponda metodo, kies detalojn difinu la Estraro. La nombro da seĝoj en la balotota Komitato estas limigita je 18.

Poras : Unuanime (12)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

4. Instruado kaj ekzamenoj

Informoj : 1. La 11^{an} de Junio 2006 en Valenciennes ekzameniĝis 8 homoj (4 unuagrada kaj 5 dua-gradaj*) – ĉiuj sukcesis. Bone disvolviĝis la regiona sesio kun la helpo de la klubo Valenciennes-Espéranto kaj laŭ la nova sistemo interkonsentita de la Federacio kaj FEL. (* Unu trapasis ambaŭ gradojn.)
2. La regiona ekzamensesio en Junio 2007 okazos en Valenciennes aŭ Lille. Pri la urbo, la loko kaj la dato decidis la Estraro plej malfrue en Januaro 2007.
3. La aĉeto de lerniloj far kluboj povas naski iom tro pezan elspezon. Tiukadre XD proponas partan aŭ tutan monkontribuon de la Federacio al la asocioj-membroj por la aĉeto de la lerniloj. – AP instigas al la vizito de la abunda retejo *Edukado.net* por trovi lernomaterialon.



4. Instruado kaj ekzamenoj

Decido :

La Federacio monkontribuos al la elspezoj de la asocioj-membroj por la lernilaro ekde la lernjaro 2006–2007. Tiu monkontribuo estos laŭpeta, kaj fariĝos surbaze de atestiloj (fakturoj k.s.) provizitaj de la asocio-membro al la federacia kasisto.

Poras : Unuanime (12)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

5. Kulturo kaj aranĝoj

Informoj : La Eŭropa Rendevuo de Morbecque (ERM) okazos la 18^{an} kaj 19^{an} de Nov. 2006. FV jam ricevis aliĝilojn, sed ni instigu la homojn al rapida sendo de siaj aliĝiloj. La Estraro komunikos al la gazetaro pri la ERM, same kiel pri la pasinta kongreso kaj la ekzamensesio. XD memorigas la decidon de la Komitato (20 Nov. 2005) por starigo de pretiga skipo en Morbecque (§ 3, decido 2^a).

Decido :

FV, RV, XD, AP kaj EP konsistigas la pretigan skipon : ili rendevuu en Morbecque sabaton matene la 18^{an} de Novembro 2006 por pretigi la salonojn de la stagejo.

Poras : Unuanime (12)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

6. Regiona kunordigado

Informoj : **1.** XD informas pri la reformprojektoj de UFE koncerne la kotizosistemojn kaj la retejojn kaj pri la baldaŭa servo de UFE por komuna membrolista datumbazo. La Federacio ne tuj provos la reformprojekton pri ununura kotizo (entenanta la partojn landan, regionan kaj urban), sed tre atente plu partoprenos la laborojn super tiu temo pere de XD. – La venonta landa kongreso okazos fine de Majo 2007 en Bourg-en-Bresse (Rhônes-Alpes) ; la posta okazos Paskon 2008 en Martigues (Provence) laŭ la ekzemplo de *Boulogne 2005*, nome kunestos UFE kaj SAT-Amikaro (povos konsili la Federacio). **2.** XD informas pri la dua kunsido de la Interfederacia Konferenco en Rennes la 7^{an} de Majo 2006 : la francaj regionaj federacioj interkonsentis pri diversaj aferoj, i.a. pri la ekzamensesioj kaj pri interŝanĝoj de la federaciaj informiloj. La Konferenca protokolo estas legebla en la federacia retejo.

7. Komunikado

Informoj : Agado sur la komunika kampo estas plej grava por la diskonigo de Esperanto en norda Francio. Komunikado estu prioritato de la Federacio. Ni komuniku al la gazetaro kaj la publiko pri la nordfranciaj Esperanto-aranĝoj ; ni kiel eble provu kunigi niajn Esperanto-aranĝojn kun aliaj, eksteraj kulturaj aranĝoj (precipe rilate la federaciajn kongresojn [vd. § 3]). La Federacio disponigu al la asocioj-membroj propagandilojn kaj varbilojn, ekz. la novan UFE-varbilon t.n. *L'espéranto, la langue équitable*.

Kromaj informoj :

1. La precizan daton de la venonta federacia kongreso en Arras oni anoncos okaze de la Eŭropa Rendevuo de Morbecque aŭ rapide poste.
2. La Estraro sendos al UFE la jarraporton de la Federacio ĝis la fino de Nov. 2006.
3. La Estraro planas la venontajn du komitatkunsidojn en Jan./Feb. kaj en Maj./Jun. 2007.

Protokolo farita la 29^{an} de Oktobro 2006.



XAVIER DEWIDHEM

Prezidanto



Aneksajo 1.

Modifoj de la interna regularo de la Federacio*

Le Conseil fédéral d'Espéranto-Nord, réuni le 15 octobre 2006 à Lille, adopte les modifications au règlement intérieur suivantes :

1. Sous réserve et à compter de la modification de l'article 4 des statuts par l'Assemblée générale tendant à y indiquer le siège de la Fédération (adresse complète du président en exercice) :

a. L'article I-2 est abrogé ;

b. L'article I-1 *bis* est renuméroté en article I-2.

2. Le troisième alinéa de l'article III-2 est ainsi rédigé :

« Le nombre de membres issus d'une même Association adhérente est au moins égal à un et ne peut excéder le tiers du nombre total des membres du Conseil. »

3. La dernière phrase du second alinéa de l'article IV-3 est abrogée. Il est ajouté un troisième alinéa ainsi rédigé :

« Le président de la Fédération est président de droit des commissions permanentes. Chaque commission désigne en son sein un vice-président. Les commissions se réunissent chaque fois qu'elles sont convoquées par le président ou sur la demande de la moitié au moins de leurs membres respectifs. En cas d'absence ou d'empêchement du président, les commissions peuvent être convoquées et sont présidées par leurs vice-présidents respectifs. »

* La interna regularo de la Federacio estas legebla en la federacia retejo : <http://esperanto.nord.online.fr/fr/federation/reglement.htm>

